Testu vian memoron!

Ne rigardu la bildojn, kaj respondu la sekvantajn demandojn.

1 Ĉu Pablo legas ĵurnalon?
2 Kion li legas?
3 Kia estas lia libro?
4 Ĉu Petro mortigas muŝojn?

5 Kiu faras tion?
6 Kiom da muŝoj flugas super Sinjoro Nopo?
7 Ĉu la vermo manĝas bananon?
8 Kion ĝi manĝas?

9 Ĉu Ramono trinkas vinon.
10 Kiu faras tion?
11 Ĉu la botelo de la ebriulo estas malplena aŭ preskaŭ malplena?
12 Ĉu la glaso estas preskaŭ malplena aŭ tute malplena?

13 Ĉu Maria amas la scienciston?
14 Kiun ŝi amas, kaj kiu amas ŝin?
15 Ĉu ŝi kaj li ridetas?
16 Kiu staras, kaj kiu sidas?

17 Kiom da tramoj venas, kaj kiom da tramoj iras?
18 Kiom da personoj atendas la tramojn?
19 Ĉu Rikardo fumas longajn, blankajn cigaredojn?
20 Kion li fumas?

21 Ĉu Petro laboras?
22 Kion li faras?
23 Kia estas lia lito? Tro longa aŭ tro mallonga?
24 Kiu pensas, kaj kiuj parolas?

25 Ĉu Mipi kaj Mupi parolas france kaj germane, aŭ esperante kaj angle?
26 Kie estas Mipi kaj Mupi? Sur la naŭa bildo aŭ sur la dua bildo?
27 Lernu rapide, ripetante la paĝon!